

ESPERANTO

Internacia Gazeto duonmonata de Universala Esperanto - Asocio

For la iluzion !

Eĥoj - Neŭtraleco - Nia sinteno - Ĝeneralaj konsideroj - For la iluzion

Eĥoj

Nia artikolo « *Kien ni iras* » en la Septembra numero, havigis al ni aron da respondoj, aprobaĵoj, kaj kontraŭaĵoj.

Aprobis legantoj el demokrataj landoj.

Germana kaj hungara legantoj protestis. Mallonge kaj militiste la germana : « *Entute falsaj estas viaj priskriboj, ne plu sendu vian gazeton al mi* » kaj kiel saluton « *Heil Hitler* » !

Klarigante kaj serĉante kompreni komplikajn kvereladon kelkjarcentan, skribis la hungara.

Nia hungara leganto, malnova membro de UEA protestis ĉefe pro la simpatio esprimita al ĉeĥoslovaka popolo. Kaj opinias, ke ni rompas la tradician neŭtralecon. Plie li rimarkigis, ke ni ne simile esprimis nin pri la dispecigo de Hungarlando 1919 kaj aliaj maljustaĵoj de la « *pac-diktatoj* ».

La formo de tiu ĉi senpasie prezentita vidpunkto, meritas respondon, tiom pro principoj kiom pro korekteco.

Neŭtraleco

UEA estas neŭtrala rilate religio, nacieco, politiko kaj sociaj demandoj, tekstas Art. 4 de la Statuto. Videble la difino datas el tempo malpli konfuza ol la nuna.

Pri la *principo* de neŭtraleco oni ne diskutas, nur pri la *interpreto*. Dum relative normala tempo, la neŭtraleco praktikigis tiel, ke oni ne tuŝis ion, kio povus naski disputadon senfinan. Antaŭ la grava laborado plenumota por ideo ĝenerala, tia sinteno pravigas.

Neniam UEA partoprenis en afero, manifestado, deklaro, kiu kontraŭas la neŭtralecon. La gazeton kaj ĝian redaktadon regas ĝena artikolo de la statuto (Art. 51).

La *revuo* estu gvidata laŭ la ĝisnuna tradicio kaj enhavu nenion kontraŭ la celoj aŭ la interesoj de la Asocio. Escepte tio, la Redaktoro ĝuu en sia laboro plej eblan liberecon. Objektivaĵoj informoj pri iaj okazintaĵoj estas permesataj.

Kaj pri la celoj de UEA diras la statuto

disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto

plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo ;

krei internaciajn servojn uzablajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio ;

kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.

Jen la gvidlinioj laŭ kiuj ni devas labori.

Nia sinteno

Dum la jaroj postmilitaj la sinteno de nia gazeto estis alia ol nun. Sed tio neniel signifas, ke ni trovis ĉion perfekta, kion oni faris en 1919 por ke efektiviĝu la deziro de ĉiuj « *neniam plu milito* ». Tamen ni fidis en la bona volo de kelkaj ŝtatestoj, atingi maksimumon de justeco interpopola per pacaj rimedoj, sen perforto. Ni fidis, ke el la Ligo de Nacioj, disradiu la spirito de bonvolo, necesa por pace reguligi ekzistantajn malbonaĵojn.

La spirito de bonvolo estis forpelita iom post iom per la rutino, per la malgrandaj kombinoj kaj per la konstanta cedo en problemoj principaj. Kiel esperantistoj ni perdis la fidon okaze de l'diskutado pri la adopto de Esperanto kiel internacia lingvo.

Ni havis iluziojn (kiu ne havis ilin ?) Ni fidis, ke la evidentaj maljustaĵoj, estas forigitaj per pacaj procedoj. La jura instrumento ja ekzistis en la « *pacdiktatoj* » mem. Kaj ni esperis...

Hodiaŭ nia sinteno estas videble alia. Nia movado, eĉ en plej malhelaj tagoj de l'milito, neniam estis persekutita. Kiel kuriozaĵon ni nur menciui, ke dum la milito nia gazeto « *ESPERANTO* » estis malpermesita en Francujo « *ĉar ĝi povus mal favore influi batalanton ĉe fronto* » !

La situacio entute ŝanĝiĝis depost 1933. Ni memoru la iom post ioman forigon de nia movado en Germanlando. La opinio pri nia lingvo en la libro « *Mein Kampf* » ni ne diskutas : estas subjektiva juĝo.

Multe pli grava estas la prijuĝo de nia movado kaj ideo en miliona broŝuro « *Senmaskigita Framasoneco* ». Ni citu tiun-ĉi elverŝon de maltrankvila animo :

« *Tiel estras la sekreta juda registaro hodiaŭ la duan Internacion, kun ĝia sidejo en Bruselo, la trian Internacion kun sidejo en Moskvo, la Universalan Esperanto-Asocion, la Pan-Eŭropa-Movadon, gvidatan de la bastardo Grafo Nikolao Coudenhove-Kalergi laŭ komisiio de la judaro, la Ligon de Nacioj kun ĝia sidejo en Genevo kaj ĉiujn grandajn trustojn kaj kartelojn, speciale la armad-industrian kaj ne laste la tutmondan Ligon de la framasonoj* ».

Se tiaj ridindaĵoj disvastiĝus nur interne de Germanlando ni nenion dirus. Sed la giganta propagando

germana en ĉiuj landoj, la konstanta inundo papera de l' tuta mondo per tiaj pamfletoj ne povas nin lasi « *neŭtralaj* ».

Paralele kun la provo subminadi landojn liberecajn iras la nuligo de nia movado. Esperanto kiel lingvo kaj movado estas intime ligataj al minimumo da individuaj liberecoj, ne diskutante formon de regado.

Kaj nia esperantista devo paralelas kun tiu de civitano de lando sin defendanta kontraŭ agado de « *Gleichschaltung* » spirita, kondukanta eble al politika aligo. Kaj estas nia devo de homarano, ne forgesi la viktimojn de tiu ĉi malhoma « *nova sento* ».

Tion farante ni agas en la kadro de la pravigita defendo de propraj interesoj.

Konkludo : Resti indiferenta, do neŭtrala laŭ malnova kompreno, estus perfidigo de niaj idealoj. Esperanto staras kaj sukcesas nur kun reĝimo respektanta liberecon individuan.

Apartenas ankaŭ al nia epoko rapide forgesi bonajn agojn. Kiam malaperis Aŭstrio kiel sendependa ŝtato, neniu kuraĝis esprimi kion ni perdis... Aŭstrio estis por nia movado regno multpromesa. Ĝia registaro subtenis nian penadon. Ĉu ni tion tute simple forgesu ?

Kaj Ĉeĥoslovakio apartenis al tiuj landoj, kie Esperanto fariĝis popola movado. La registaro subtenis nian movadon. D-ro Beneš kiel ministro estis unu el la unuaj ŝtatestoj, kiuj en la Ligo de Nacioj, klopodis favore al Esperanto.

Ĉeĥoslovakio fariĝis viktimo kaj kun ĝi, eble nia movado en tiu ĉi lando ankaŭ. Fine, oni ja ne forgesu, ke Ĉeĥoslovakio cedis por eviti ion pli teruran. Hodiaŭ tio ŝajne jam estas forgesita.

Ĝeneralaj konsideroj

Simpatianta kun sorto de popolo kaj de amikoj en regno, kiu laŭ konstitucio kaj multaj aspektoj kapablis egaligi maljustaĵojn, tio ne volas diri, ke ni fermis la okulojn al faritaj eraroj. Ni mem defendis en pasintaj jaroj la rajton de sudetgermanoj kaj hungaroj en UEA, pri la uzo de iliaj lingvoj en la loknomoj. Ni aldonu, ke klarvidaj ĉeĥoj subtenis nin morale en tiu ĉi arda batalo pri loknomoj kaŭzinta multan enuon al la redaktinto de la jarlibro, kiel ankaŭ senutilan perdon de tempo kaj mono.

La distranco de Ĉeĥoslovakio neniel rebonigas faritajn erarojn en 1919.

La diktaton de 1919 anstataŭis la « *diktato* » de 1938. En si mem nenio ŝanĝiĝis en la metodoj.

La nacieca principo, kies ĉampiono estis Napoleono III-a detruis la ekonomian tutaron de Aŭstrio-Hungarlando. Ĝi detruis, dank' al premo eksterordinara, la koncepton de Ĉeĥoslovaka ŝtato. Kiom ajn eraris la ĉeĥoslovakaj politikistoj kaj ŝtatestoj, oni neniam forgesu, ke iliaj popoloj formis en pasinto malplimulton premegitan. Kaj la okazinta cedo estis sekvo de premo ankoraŭ multe pli forta : proporcio 12 kontraŭ 1.

Se temus nur pri la centprocenta apliko de la principo nacieca kaj ĝia superfortigo per la « *Blubo* » 1 doktrino, oni ja fermus la okulojn. Sed temas pri io alia. Per la detruo de l'ĉeĥoslovaka ŝtato, oni forigis la ekvilibron de Eŭropo kaj oni malfermis la vojon al oriento al la ekspansio germana. Bone. Ĉiu popolo rajtas vivi kaj estas certe, ke la organiza kapablo germana, la povo absorbi senlime agrikulturajn produktaĵojn intersange kontraŭ industriaj, vivigos la ekonomion de la oriento kaj de l'Balkano.

Tiu ĉi ekonomia ekspansio estas pravigebla. Sed ĝin puŝas la doktrino de la rasa kaj nacia supereco brue propagandata. La landoj kun

germanaj minoritatoj urĝas sin aranĝi laŭ plej bona maniero. Iam ekzistis tiel nomita protekto de la minoritatoj. Hodiaŭ oni devus pensi kiamaniere protekti certajn regionojn kontraŭ certaj iliaj minoritatoj.

For la iluzion

For la iluzion ke la akordo en München savis la pacon. For la iluzion, ke ia « *Modus vivendi* » estos ebla por pli longa tempo inter du mondperceptoj sin kontraŭantaj kiel fajro kaj akvo. For la iluzion ke per « *neŭtraleco* » nia ideo trovi gracon en totalecaj ŝtatoj.

Ni vidu la realon. Kaj ni revivigu inter la Esperantistaro la spiriton kiu gvidis D-ron Zamenhof kaj la pionirojn. Dank'al ili Esperanto fariĝis lingvo, ne por nura plibonigo de la komercaj rilatoj, sed unuavice por helpi al pli bona kompreno interpopola. Spite ĉiuj malhelpoj, nia ideo tamen venkos.

H. J.

¹ *Blubo* = Blut und Boden, t.e. Sango kaj tero : mistika difino de la rilato inter la tero aŭ grundo kaj la raso aŭ popolo kiu ĝin posedas, prilaboras kaj el kiu ĝi ĉerpas sian procecan forton.

Universala Esperanto - Asocio

Oficiala informilo 1938-9

Elektio de la Komitato

La Provizora Komitato de UEA, en sia lasta kunveno en Genève 23/24 Oktobro, ekzamenis la proponojn pri kandidatoj al la nova komitato de UEA.

Pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj, la nombro de unu komitatano po kvincent aktivaj anoj estas ŝanĝita. La proporcio de komitatano estas fiksita de unu po cent membroj.

Estas elektataj de la Delegitoj de UEA 12 komitatanoj. Jen la listo :

Lando aŭ grupo de landoj	Kandidato
Anglujo, Skotlando Irlando :	S-ro A. W. Thomson (Aroto).
Belgujo :	S-ro Renaud Richez.
Bulgarujo :	S-ro Atanas D. Atanasov (Agro).
Ĉeĥoslovakio :	S-ro O. Sklenčka.
Estonio, Latvio, Litovio :	F-ino Helmi Drezen.
Francujo :	S-ro Daniel Chagnoux.
Jugoslavio :	S-ro Rad. P. Klajić.
Nederlando :	S-ro J. Baart de la Faille.
Polujo :	S-ro D-ro A. Czubyński.
Skandinavaj landoj :	S-ro Vilho Setälä.
Svislando :	S-ro K. M. Liniger.
Usono-Ameriko :	S-ro Joseph Dubin.

Oficiala Bulteno 32

Komence de Decembro eliras la O.B. 32 kun informoj pri la nova jaro, la agado de UEA, kaj ĉefe pri la elekto de la komitato.

Ni petas la Delegitojn, ke ili bonvolu resendi plej rapide la respondojn por la nova Jarlibro kiel ankaŭ la voĉdonilon.

La O.B. estas sendata al 400 Delegitoj, (sen Aŭstrio kaj la sudetgermanaj regionoj).

Esperantista interhelpo

La laboro pri tiu ĉi servo kreskas de tago al tago kaj estas verŝajne, ke pro la novaj leĝoj pri nedezirindaj ŝtatanaj en certaj landoj, nia servo ricevos pliajn petojn pri interveno. Ni altiras vian atenton al la speciala rubriko pri tiu ĉi agado sur la aldona folio de tiu ĉi numero.

Centra Oficejo de UEA.

Genève, 30 Nov. 1938.

niversala Esperanto - Asocio

Centra Oficejo : Palais Wilson, Genève, Svislando

33/89/26

Instalaĵoj

permesantaj krei en koncernaj urbaj institutoj kuracajn kondiĉojn, similigitajn al la kondiĉoj en la montaj altaĵoj.


De Ignaco Mościcki

Referaĵo, prelegita dum konferenco, okazinta en la Reĝa Kastelo en Varsovio la 26-an de Januaro 1934. La konferencon partoprenis, laŭ invito de la Prezidanto de l'Pola Respubliko, reprezentantoj de l'medicina kaj fizika sciencoj

Kun permeso de l'aŭtoro tradukis
Edvardo Wiesenfeld, L. K.


(FINO)

Sur la tabulo 2-a ni vidas la kurbojn de l'temperaturoj (t_k) de l'aero, eliranta el la malvarmigilo-kondensilo en dependeco de l'procento de relativa malsekeco kaj de l'aer-temperaturo (t_a) eniranta en la ĉambron. Do ekzemple dezirante havi en la ĉambro 40 %-an rel. malsekecon ĉe ĉirkaŭ 15 1/2° C, la aer-temperaturo, eliranta el la malvarmigilo-kondensilo (t_k) devas havi 1° C. Nature, se ni iras kun la relativa malsekeco pli alten, ankaŭ la eliranta el la kolono aer-temperaturo estas iom pli alta.



t_k en dependeco de la % de la rel. malsekeco kaj t_a .

Nun mi transiras al la dua parto de l'instalaĵo, kaj nome al la lumigado de l'en la ĉambron eniranta aero per kvarca lampo. La lumigado, montrita sur la ilustraĵo 3-a estas, kiel ni vidas, alispeca ol tiu ĝis nun aplikata en la medi-




cino. La radioj de l'kvarca lampo, ĉirkaŭŝirmata per spegula reflektilo, respeguligas kaj dispersigas sur la malglata surfaco de ekrano. Tiu ĉi ekrano estas farita el latuna lado, kies surfaco estas konvene prilaborita, malglata kaj poste elektrolize ĥromumita. Tiu ĉi metalo bone taŭgas por tiu celo kaŭze de : granda emo reflektadi,

precipe la mallongajn radiojn, forta malmoleco, pasiveco en la ĥemia senco kaj sekve longtempa daŭreco.

La malutilaj superflujaj kvantoj da ozono formiĝanta dum la lampo-brulo estas forigataj helpe de ventolilo tra konforma tubkanalo.

Preparo de tiatipa ekrano postulis antaŭajn mezuradojn, dum kiuj oni profitis de l'instalaĵoj en la laboratorio de l'Rektoro Pienkowski, pro kio mi lin ĉi loke tutkore dankas.

Sur la ilustraĵo 4-a ni vidas fotografiaĵojn de l'spektr



Ilustraĵo 4
Spektro de lumo reflektigata kaj dispersigata de diversaj metaloj

- 1) malglata latuna lado ĥromumita donas spektron kun granda atingo-kapableco en la direkton de mallongaj ultra-violaj radioj, nome ĝis 2.537 Å, sekve sufiĉe malproksime de l'limo de videbla spektro t.e. ĉirkaŭ 3.900 Å.
- 2) malglata latuna lado ĥromumita, tramangita de acido kaj lasivo, donas atingo-kapablecon malpli grandan. Okazas tie ĉi pli forta absorbo;
- 3) malglata latuna lado nikelumita donas efektojn malpli bonajn ol la ĥromumita;
- 4) malglata latuna lado donas efektojn ankoraŭ pli malbonajn ol tiu lasta;
- 5) malglata lado alumina ne estas malbona, tamen — ĉar tiu metalo estas ĥemie tro aktiva, kio kaŭzas sub la influo de atmosferaj faktoroj rapidan oksidigon de ĝia surfaco kaj poste aliajn ecojn reflektajn, kaj ĉar tiu metalo estas ne sufiĉe malmola — ĝi por tiaspeca surfaco ne taŭgas;

6) glata latuna lado ĥromumita kaj polurita donas plej grandan atingo-kapablecon, kiel ankaŭ plej altan reflekt-procentecon. Ĝi tamen ne povas esti akceptata en konsideron pro sia speguleca karaktero, tie ĉi ja temas pri atingo de lumo dispersigita.

Post la diskuto, dum kiu mi petos pri plej vasta eldirado de siaj opinioj, mi montros al la ĉeestantoj la priskribitan aparataron en originala stato.

Resumo

Bazigante sur kuracistaj spertoj kaj sur propra observado pri la utila influo de l'montara klimato je la sano, l'a aŭtoro analizas la atmosferajn kondiĉojn renkontatajn en la montaroj kaj konstatas ke koincidas tie la jenaj faktoroj :

- 1) speciala pureco de l'aero ;
- 2) granda kvanto da ultra-violaj radioj kaj pli granda aer-joniĝo ;

- 3) enesto de tre malgrandaj kvantoj da ozono ;
- 4) pli malgrandigita atmosfer-premo.

Al tiu lasta faktoro la aŭtoro ne atribuas pli grandan signifon por la sano. Koncerne la ceterajn faktorojn la aŭtoro eksperimentadis multajn provojn kaj observojn, aplikante purigon de l'aero alkondukata al la loĝejoj. Tiucele li uzadis originale elpensitan aparataron, kiu permesas alkonduki en ventolatan ĉambron ĉirkaŭ 500 m³ da purigita aero dum horo helpe de sistemo de filtriloj kontraŭ malmolaj kaj gasaj malpuraĵoj. Tiamaniere la purigita aero, postkiam oni ĝin estas alkondukinta ĝis plej dezirataj temperaturo kaj malsekeco, estas subigata al surlumigo per hidrarga lampo, kiu pere de spegula reflektilo jetas la lumon sur ekranon el laŭna lado kun pizumita surfaco kovrita per ĥroma tavolo. Pro tiu kaŭzo la lampaj radioj dispersigas kaj funkcias egalmaniere, ne elvokante la malagrablan por la okuloj brilon, nek brulumojn de la haŭto. Ĥroma ekrano evidentiĝis plej konvena, ĉar ĝi absorbas ultra-violajn radiojn relative malaltgrade kaj ankaŭ distingigas per granda pasiveco en ĥemia senco. La aero tiamaniere surlumigita estas sufiĉe jonigita kaj, per konvena elektroŝargo de l'ekrano, estas eble ricevi superpezon de pozitivaj aŭ negativaj jonoj. La enesto de ozono en la montara aero ne havas, laŭ la aŭtoro, signifon. Minimumaj kvantoj da ozono ne povas havi desinfektan signifon, kaj pli grandaj kvantoj influis malutile la memkonscion kaj san-staton. Krom tio, dum la elektraj malŝargoj formiĝas apude de l'ozono ankaŭ malutilaj por la sano nitrosiloj (nitraj oksidaĵoj). Tial la aŭtoro decidis forigi la formigantan ozonon el la proksimeco de l'hidrarga lampo pere de speciala enspirilo (exhaustor).

La tiamaniere purigita kaj surlumigita aero posedas ĉiujn kvalitojn de freŝeco kaj pureco de montara aero, influas refreŝige kaj ebligas krei klimatajn altmontarajn kondiĉojn por kuracaj kaj ripozaj celoj en la grandaj urboj kaj malaltaĵoj.

Bibliografia Servo

- *** Esperantista Kalendaro 1938 Eld.: Esperanto-Asocio de Estonio (Postkast 6, Tallinn). 24 paĝoj. Formato 13 × 9 cm. Prezo ne indikita. (1938-16).
- F. V. Dorno: La Aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa. Eld.: la aŭtoro. Generala Deponejo: O.E.L. (Battelsches-teenweg 303. Mechelen, Belgujo). 64 paĝoj. Formato 19 × 15 cm. Prezo ne indikita. (1938-17).
- K. Włostowski kaj W. Dobrowolski: Surdmutoj pri si mem..., trad. Süßkind Schönberg Eld.: la tradukinto. Presejo « Afiszowa » (M. Spiegelstein, Warszawa, Polujo). 48 paĝoj. Formato 17 × 12 cm. Prezo : Zł. pol. 1. — aŭ du internaciaj respond-kuponoj (1938-18)
- *** Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo 1938. Eld.: IEL (Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo). 350 paĝoj. Formato 16 × 11.5 cm. — Nur por membroj de IEL. — (1938-19).
- *** Jarlibro de la Esperanto-Movado 1938. Eld.: UEA. (Palais Wilson, Genève, Svislando) 255 paĝoj. Formato 16 × 11.5 cm. Vendoprezo Frk. sv. 5.—, senpage por membroj de UEA (1938-20)
- *** Libervola Civila Helpservo Internacia. Eld. : Sekretariejo de L.C.H.I. (Klaraweg 6, Bern, Svislando). 16 paĝoj. Formato 21 × 14.5 cm. Prezo : ne indikita. (1938-21).
- *** 1937/38 BES-a Adresaro (13-a eld.). Eld. : Berger'a Esperanto-Servo (BES) (Poštejn, Ĉeĥoslovakio). 48 paĝoj. Formato 14.5 × 11.5 cm. Prezo : Kč. 8.— (1938-22).
- D-ro Vallienne : Ĉu li ? reviziis Kol. Kalocsay. Eld. : Literatura Mondo (Soroksári-ŭtca 38-40, Budapeŝt-IX, Hungarujo). 195 paĝoj. Formato 19.5 × 13.5 cm. Prezo : ne indikita. (1938-23).
- K. Kalocsay — G. Waringhien : Plena Gramatiko de Esperanto (dua tralaborita eld.). Eld. : Literatura Mondo (Soroksári-ŭtca 38-40. Budapeŝt-IX, Hungarujo). 490 paĝoj. Formato 20 × 13.5 cm. Prezo en USA-Dol. : Broŝ. 2.60 — Bind. 2.95 + 10% sendkosto. (1938-24).
- J. F. Horrabin : Skizo de Ekonomia Geografio. trad. B. Ross. Eld. : Sennacieca Asocio Tutmonda (67 av. Gambetta, Paris-20. Francujo). 134 paĝoj. Formato 20 × 14 cm. Prezo : Frk. fr. 20. — (1938-25).
- Petro Kropotkin : Al la Junuloj kaj Biografio. Eld. : Sennacieca Asocio Tutmonda (67 av. Gambetta, Paris-20. Francujo). 54 paĝoj. Formato 18 × 12 cm. Prezo : Frk. fr. 6.— (1938-26).
- Petro Danov : La Majstro Parolas. Eld. : « Frateco » (Sevlievo, Bulgario). 153 paĝoj. Formato 17.5 × 13 cm. Prezo : ne indikita. (1938-27).
- P. Lapienė (tradukinto kaj kolektinto) : El Litova Poezio. Eld. : Litova Esperanto-Asocio (Žemaičių g-vė 15, Kaunas, Litovio). 198 paĝoj. Formato 19 × 12.5 cm. Prezo : Lt. 3.— (1938-28).
- Knut Hamsun : Victoria, trad. Olav Rygg. Eld. : Norvega Esperantista Ligo (Oslo, Norvegujo). 100 paĝoj. Formato 19.5 × 13.5 cm. Prezo : N.Kr. 2.— (1938-29).
- B. Giedra : Violetoj (versaro). Eld. : Litova Esperanto-Asocio (Žemaičių g-vė 15, Kaunas, Litovio). 64 paĝoj. Formato 16 × 10.5 cm. Prezo : Lt. 1.15 aŭ USA-Dol 25.— aŭ egalvaloro. (1938-30).
- J. B. Gresset : Ver-Vert (poemo en kvar kantoj), trad. Célestin Rousseau, L.K. Eld. : Esperantista Centra Librejo (11 rue de Sèvres, Paris-6, Francujo). 32 paĝoj. Formato 21 × 13.5 cm. Prezo : Frk. fr. 4.— (1938-31).

Universala Esperanto - Asocio

ĉe la sojlo de nova jaro

Je la 31-a de Oktobro 1938 UEA finis sian 30 jaran ekzistadon. Kaj baldaŭ finiĝos la jaro 1938, kiu apartenas al la « nigraj » paĝoj en la homara historio.

Peze premas la tutan mondon la nuna situacio malcerta. Neeble ŝajnas trovi eliron. Profetoj ĉiaspecaj ekstaras, kiuj, profetante jen pereon de l'mondo, jen rozkoloran estonton. Ambaŭ estas iel danĝeraj: la ĝusta sinteno estas konsciigi pri la ekzistantaj moralaj fortoj en la homoj, fortoj kiuj bezonas ankaŭ pruviĝi en momento de danĝero.

Ni vidas hodiaŭ nur la malbonon. Kaj ne konsciigas pri la bono kiu kvazaŭ ekstaras apud ĝia misfrato. Ni vidas maljustaĵojn, ni vidas la persekutitojn, ni vidas la frenezajn kuron al la abismo pro la senhaltita sinarmigado. Sed vekiĝas la fortoj moralaj. Ĉie, post ioma inertece leviĝas la helpemo, sen ordono de ĉefoj, spontanee kaj kore. Kaj formiĝas la kontraŭstaro al decido per armiloj, precize en landoj kun dinamika regformo.

La homara solidareco revenas. Komence timeme, sed nun pli forte kaj pli decide. Ĉie en la mondo la nevidebla armeo de bonvoluloj kolektiĝas preta por la nobla batalo.

Ĉi tiujn signojn de l'tempo ni vidu kaj ni ĉerpu el ili la nepran konvinkon, ke fine

venkos la spirito

kaj ne la kanonoj! Kaj eĉ se la homaro denove interbatalus: la fina parolo, super ruinoj, apartenos tamen al la spirito de bonvolo kaj ne al la perforto.

En tiu ĉi giganta spektaklo kiu filmosimile preterpasas nin, nia movado suferas videble. Unuflanke la totaleca doktrino « Unu regno, unu popolo, unu lingvo » malŝatas ideon, kiu proklamas respekton al la aliaj. La dua danĝero estas in-

ter ni mem. Estas la manko de klara kompreno pri celo de nia klopodo, la inertece kaj la suprajeco, ecoj ja troveblaj ĉie, sed tre videblaj inter ni.

Resume: Nia movado respegulas la tempon en kiu ni vivas. Sed same kiel la cetera mondo retrovos sian ekvilibron, ankaŭ moviĝos iun tagon, la nekonataj fortoj en la vicoj esperantistaj. Kaj tiam ree ekfloros nia arbo kaj portos siajn fruktojn, pli belajn ol ĝis nun.

UEA en la torento

Spite profetaĵoj malbonvolaj, UEA trairis la tridekan jaron de sia ekzisto, la duan post la disiĝo en 1936. Decide kaj trankvile, ĝi iris sian vojon. Al la bruemaj eldiraĵoj de l' alia flanko de nia movado, ni metis la silentan laboradon por idealo.

Estas vero, ke ne sekvas nin plu miloj. Sed la kelkcentoj kiuj sekvas la flagon de UEA, scias pro kio. Kaj laŭ komerca vidpunkto, la malplimulto de membroj, signifas malpli grandan perdon financan. En 1938 ni povis fini kun normala perdo, egaligita per flankaj gajnoj kaj bonvola helpo. La kostoj senteble falis ĝis nivelo neniam esperita. Kaj tio ne influis la liveradon de la laŭstatute promesitaj (sekve ŝuldataj) objektoj. Aperis regule la gazeto, aperis denove inda Jarlibro kun enhavo valora.

Kaj spite la modestaj rimedoj, UEA kreis novan servon, ne por « fari monon », sed por helpi al viktimoj de la nuna maljusteco. Je centoj sumiĝas la konsiloj, informoj kaj intervenoj por mildigi la sorton de senhejmuloj.

Ni eniras la 31an administran jaron de la Asocio. Nia agadplano

estas simpla: Daŭrigi kaj konteni. Daŭrigi la ordinarnajn laborojn, adaptante ilin al la ŝanĝanta tempo. Eldoni la gazeton, eldoni la jarlibron kun riĉa enhavo, plenumi la devon laŭstatutan. Sur la kampo internacia, ni proponis solvon de dualismo inter la esp. organizaĵoj. Ni deklaris nin pretaj kunlabori. Al la utopia *UNUECO* organiza, ni kontraŭmetas la *UNUECON* idean, pli necesan kaj pli laŭtempan.

Krom ĉi tiuj laboroj kvazaŭ tradiciaj, ni daŭrigas subteni laŭpove la samideanojn suferantajn. Ĝuste nun alvenas ĉiutage petegoj, krioj, kiuj disŝiras la koron.

Se vi deziras ke venku inter ni la spirito de bonvolo, la spirito de D-ro Zamenhof, tiam subtenu vian organizaĵon, la malnovan UEA, la bataltrupon neproklamitan de la « Interna ideo ». Realigu al UEA, varbu por ĝi, por ke plifortiĝu la verda armeo de la paciaj batalantoj

Provizora komitato de UEA.

Praktikaj informoj por aliĝi

Uzu aliĝformulon kaj pagu vian kotizon al la Delegito de via loko. Se tia ne estas, aŭ se estas alia malhelpo, tiam pagu al la ĉefdelegito.

En landoj kie ne funkcias dumtempe la teritoria organizo, oni povas pagi al la poŝtekkonto de la Centra Oficejo de UEA (Vidu la liston ĉi tie).

En Rumanujo oni baldaŭ povos pagi al poŝtekkonto de UEA nun malfermata. La membrojn en Rumanujo ni informas rekte.

Internaciajn respondkuponojn ni akceptas por ĝia interŝanĝa valoro t.e. 0.30 Fr. sv.

Dum nuna monato eliros cirkulero al ĉiuj nunaj membroj de UEA.

Ĉefdelegitoj, perantoj, pagejoj de UEA

Argentino

Esperanto-Centro Argentina, Strato Gallo 1106, Buenos-Aires.

Aŭstralio

Rekte al C.O. de UEA.

Belujo

Poŝtekkonto: 1842.00 Bruxelles.

Brazilo

Rekte al C.O. de UEA (Poŝtmarkoj neuzitaj kun Esperanto teksto akceptataj).

Britlando

Ĉ.D. Albert E. Hepton, Grafton Street 89.1. Hull.

Bulgarujo

Per Rad. K. Tričkov, ul. Knjajevska 76, Vratza.

Ĉeĥoslovakio

Ĉ.D. Frant. Slavik, Teritoria Oficejo de UEA, Praha-47. — Poŝteko UEA 79.236 Praha.

Ĉinujo

Rekte al C.O. de UEA.

Danlando

Ĉ.D. : A. P. Dueholm, Bryggewangen 4, St. th. København-O.

Egipto

Rekte al C.O. de UEA.

Estonio

Ĉ.D. F-ino Helmi Dresen, Postkast 6. Tallinn.

Finnlando

Ĉ.D. O. Laukkanen, Kluuvikatu, 5, Helsinki.

Francujo

Ĉ.D. D. Chagnoux, 10, rue Rosa-Bonheur, Yzeure (Allier). Poŝtekkonto: Clermont-Ferrand 99.86.

Greklando

Ĉ.D. Stavro Patsouris, 29, Odos Tsamadou, Athènes.

Germanujo

Jara abono 6.—, ½ jara 3 Gmk.

Hungarujo

Per. : Literatura Mondo Soroksári 38, Budapest IX. Poŝtekkonto: Bleier-Vilmos 25-168 Budapest.

Italujo

Ĉ.D. S-ro. Corrado Cerri, Ramazzano (Perugia) Poŝtekkonto: 5-742, Firenze.

Japanujo

Rekte al C.O. de UEA.

Jugoslavio

Ĉ.D. Radomir Klajić, Svetosavska 23, Beograd, aŭ per poŝtekkonto de UEA, Zagreb 40.759.

Latvio

Ĉ.D. T. Indra, Kr. Barona iela 104. dz. 19, Riga.

Litovio

Ĉ.D. A. Poška, Laisvės Aleja 36-13, Kaunas.

Nederlando

Ĉ.D. : J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Poŝtekkonto: 2426.19, Rotterdam.

Norvegujo

Rekte al C.O. de UEA.

Novzelando

Ĉ.D. L. E. Dust, 20 Chelsea Str. Miramar, Wellington E-4.

Polujo

Ĉ.D. J. Šapiro, 33 ul. Marsz. Piłsudskiego, Białystok. Poŝtekkonto: 60.047 Warszawa.

Portugalo

Ĉ.D. Manuel de Freitas, Rua Monte da Lapa 49, 1.º, Porto.

Rumanujo

Pri pagmaniero ni informas la membrojn rekte.

Svedujo

UEA. Poŝtekkonto, Stockholm 3138.

Svislando

Rekte al C.O. de UEA. Poŝteko: Genève I. 2310.

Urugvajo

Rekte al C.O. de UEA.

Usono

Ĉ.D. J. Dubin, 646 Westview Street, Philadelphia (Penn.).

Esperantista Interhelpo — Servo de UEA —

Kun sento de teruro la civilizita mondo sciĝis pri la novaj persekutoj kontraŭ la judoj. Pro ago de ekscitita junulo, estas kulpigata la tuta judaro. Samdirektita eksplodo « spontanea » de popolaĉo detruis valorarojn de centoj da milionoj. Miloj kaj miloj da homoj estas pelataj en absolutan mizeron. Kaj rapide kreitaj leĝoj jure sankcias la forprenon de l'havaĵoj.

Krio de abomeno eliĝis de l' lipoj de milionoj. Kio ne okazis dum kaj post ĉiuj insultoj faritaj al homaro, tio nun efektiviĝis: unueca fronto kontraŭ tia hontindaĵo de l' 20-a jarcento. Kaj fine la landoj liberaj vekiĝas el inertece por helpi al la viktimoj.

La belaj deklaroj en Evian dum la Inter-registara konferenco pasintan someron, restis tiaj. La procedado por ricevi enirpermeson precipe al Usono estas modelo de zorga tre zorga burokratismo.

Tiu, kiu okupiĝas pri tio, tiu kiu ricevas ĉiutage kortuŝajn emociigajn leterojn de homoj sen hejmo, sen mono, sen rajto, simple malesperas. Ĉiu bonintenca klopodo, ĉiu penado helpi al mizeruloj iĝas vana, senefika antaŭ la fera leĝo de paragrafoj, kaj la ĉion-mortiga premilo de l' rutino.

Kion postulas energie kaj decide la homaranoj en la civilizita mon-

do estas, ke oni finu kun la deklaroj, promesoj kaj burokrataj enuiĝaĵoj. Kaj ke oni rapidu antaŭ ol miloj da senkulpaj estaĵoj pereu.

Al tiu ĉi postulo ni senrezerve aliĝas kun arda deziro, ke realiĝu la ordono: Amu kaj helpu unu l' alian!

La Esperantista Interhelpo povis plenumi ŝatindajn servojn. Temas ĉefe pri konsiloj, esploroj kaj informoj. En venonta numero de la gazeto ESPERANTO ni rakontos en libera formo pri kelkaj tipaj kazoj. Kelktage la Centra Oficejo de UEA estas plena de homoj, venantaj por serĉi konsilon.

La petojn de esperantistoj, neplenumeblajn rekte ni publikigas. Ni petis la redakciojn de l'esp. gazetoj enpresi la petojn. Kelkaj bonvolis tion fari, sed la plimulto..... silentis!

Ni ree publikigas la liston de la helpo-petoj ne plenumeblaj de la C.O. — Kiu povus helpi, ne hezitu sed sin anoncu al ni.

Esperantista Interhelpo

Servo de UEA.

Peto 1

Arangita. Petinto povos enmigri transmaran landon.

Peto 2

Arangita intertempe.

Peto 3

Arangita. Povas veturi al transmara lando.

Peto 4

Vienano, 33 jaraĝa, tajlorino tre sperta, laborinta por unuarangaj modmagazenoj en Vieno, kun bonegaj atestoj perdis oficon pro rasa kaŭzo. Serĉas rifuĝon en alia lando scias krom sian metion la mastrumadon, escepte pezaĵn laborojn. Ŝatas infanojn. Parolas flue Esperanto-n kaj scias iom la francan. Posedas regulaĵn paperojn kaj ricevas pasporton.

Peto 5

Ŝtatano germana, de juda deveno kun edzino ne-juda, serĉas rifuĝon kaj laboron en transmara lando. Preferas landon, kie li povas ankaŭ labori por la movado. Komercisto, 40 jara, tre bona propagandisto, vendisto, dum multaj jaroj reprezentanto de grandaj firmaoj (branĉo por malmultekostaj ornamaĵoj), fakulo ankaŭ en malgrandleĝaj varoj. Disponas pri bonegaj atestoj estas sana kaj energia. Akceptas kion ajn, povas veturigi aŭtomobilon. La edzino

scias krom la germana kaj Esperanto, ankaŭ perfekte la anglan.

Peto 6

Ŝtatano germana en Vieno, 53-jaraĝa kun edzino kaj 14 jara filino, devas trovi situacion en transmara lando. Serĉanto, malnova esperantisto, distingita per argenta medalo de veterano, estas eksperto pri librotenado, jure aprobita, parolas germanan kaj hungaran lingvojn, scias sufiĉe la anglan, francan, italan, estas preta akcepti kion ajn laboron. Politike sen riproĉo, disponas je regulaĵj paperoj.

Peto 7

Ŝtata oficisto (doktoro de juro), aŭstriano, 30 jara, edziĝinta, kristana konfeso, perdis la postenon, ĉar la patro estis judo. Serĉas iun ajn okupon. Posedas krom germana kaj Esperanto, la anglan, francan, ĉeĥan lingvojn. Ricevis brilan ateston pri sia ĝisnuna laboro. Politike nesuspektita.

Peto 8

Viena samideano devigata elmigri transmare serĉas oficon. Bankoficisto, 46 jaraĝa, plensana, fraŭlo, bonkarakterata. Sperta kaj diligenta laboranto en diversaj fakoj sen kaj kun klienta trafiko. Dum 28 jaroj oficisto en la plej granda aŭstria

banko Oesterr. Creditanstalt — Wiener Bankverein. Bonega atesto. Posedas kononjn pri laborado en kemia laboratorio. Akceptas kion ajn okupon. Scias anglan lingvon.

Peto 9

Juna ge-edza paro de Vieno petas enirpermeson kaj laboreblecon en kiu ajn lando. Edzo perfekte kulras, gvidas aŭtomobilon kaj faras ĉiujn domlaborojn. Edzino estas virin-ĉapelistino kaj perfekta en ĉiuj mastrum-laboroj. Helpu, helpu. Skribu al S-ro Meyer, Porzellangasse 60-III, Wien IX.

Peto 10

Juna sana germana ŝtatano, ĝardenisto laborkapabla serĉas eblecon enmigri eŭropan aŭ transmaran landon. Devas forlasi Germanujon pro mal-arieco. Detalojn per la Esperantista Interhelpo.

Peto 11

Senŝtatano, pol-juda, en Vieno, ĵurnalisto 38 aĝa, jura doktoro, devas forlasi Germanujon je la fino de la jaro. Petegas je helpo por eniri — eĉ nur provizore — en alian landon. Laboris dum 22 jaroj por Esperanto. Detalojn per la Esperantista Interhelpo, UEA, Palais Wilson, Genève.

Universala Esperanto-Asocio
La premiaro dum 1939

- 1) Premion de frupago rajtas elekti ĉiu malnova ano kiu pagis sian kotizon ĝis plej malfrue 31 Marto 1939 (por la jaro 1939).
- 2) Premion rajtas elekti ĉiu nova ano dum daŭro de l'administra jaro (de l'1-a Nov. 1938 ĝis 31 Oktobro 1939)
- 3) Premion de varbado rajtas ĉiu persono kiu varbis novan anon al la Asocio, dum la kuranta administra jaro.
- 4) Premion de Subtenanto rajtas ĉiu persono kiu pagis tiun ĉi kotizon. Subtenanto frupaginta rajtas plie la premion de frupago el listo de MA.
- 5) Premion tuj postulu. Ne atendu monaton aŭ eĉ jaron. Uzu vian rajton. Konsilinde estas indiki alian premion, se okaze elektita libro elĉerpiĝis.
- 6) Premion ĉiam kaj senescepte indiku al tiu, al kiu vi pagas vian kotizon.

Membro kun Jarlibro (MJ)

(kiu ricevas, krom la membrokarton, la jarlibron, sed ne la gazeton) rajtas elekti premion, unu numeron, el la sekvanta listo kiel :

- Frupaganto de l'kotizo ĝis fino de Marto 1939 (ĝisnuna ano kiu realiĝas por 1939).
- Nova Aliĝanto dum la tuta jaro administra, de Novembro 1938 ĝis Oktobro 1939 (se li ĝis nun ne ankoraŭ estis membro).
- Varbinto de nova ano MJ. — Membro kaj ne-membro kiu varbas novan Membron (MJ) por la jaro 1939.

- 1. F. Karinthy: Vojaĝo en Faremidon kaj Du Ŝipoj. Noveloj de la fama hungara verkisto-esperantisto. Tradukis L. Totsche. 84 p., 12x18 cm.
- 2. Peider Lansel: La Retoromanĉoj. Etnografia-lingva studo. Tradukis Georgo Agricola. 20 p., 16x24 cm. Prof. Nothnagel: La Mortado. Prelego profundsenta kaj konsoliga. Tradukis. B. Selzer. 26 p., 16x24 cm. (Du sciencaj broŝuroj de daŭra valoro.)
- 3. K. Brüggemann: El la mitologio de antikvaj popoloj. 80 p., 10x15 cm. — D-ro Rustem, Vambéry: Kriminologio. Tradukis D-ro V. Toth. 90 p., 10x15 cm.
- 4. Dreves Uitterdijk, L.K.: Miraklaj aventuroj de Sinjoro Longkrurulo. Rime verkita. Kun 152 bildoj kaj 162 strofoj 75 p., 17,5x25 cm.
- 5. E. Drezen: Analiza historio de Esperanto-Movado. Priskribo tendenca laŭ historia materialismo : multaj faktoj forgesitaj 22x14 cm., 94 p. Kun bildoj.
- 6. Julio Baghy: Viktimoj. La vivo de militkaptitoj en glacia Siberio dum la mondmilito. Jam tro bone konata verko por esti komentariita. 18x13 cm., 240 paĝoj.
- 7. Hillar, S.: Enkonduko en la pedagogion. Historia skizo. 8x11,5 cm., 20 paĝoj. Ad. Ferrière: Estonta Eduko. 72 p., 18x12 cm.
- 8. S. Grenkamp: Ĉu vi aŭdis tion? Kolekto de kelkcento da ŝercoj, spritaĵoj, bonhumoraj eldiroj, bone tradukitaj. 20x14,5 cm., 48 p., bele presita plaĉa kovrilo.
- 9. Norda Literaturo. Kolekto de literaturaj verkoj et Norda Eŭropo. Vol. I-II, kune 164 p., da bona teksto.
- 10. D-ro L. L. Zamenhof, 1859-1917. Kreinto de Esperanto. — Fotorepreduktaĵo. Grando de la bildo, 12x16 cm., gluita sur bela verda kartono marmora, granda 22x33 cm. Bela ornamo.
- 11. Kas. Smogorzewski: Pol-Pomeranio. Tradukis. S. Grenkamp. Kun 22 kartoj entekste kaj 4 plurkoloraj ekstertekste. 132 p., 25x16 cm.
- 12. Otto Ginz: Radio-Vortaro Kvinlingva. Angla Ĉeĥa, Esperanta, Franca, Germana. 11x15 cm 218 paĝoj.
- 13. O. Erdberg: Ĉinaj noveloj. 72 p., 12x15 cm. E. Drezen: Zamenhof. Priskribo de la vivo de Esperanto kun multaj detaloj nekonitaj. 48 p., 12x18 cm.
- 14. Novikov-Priboj: La submarinistoj. Novelo realisma pri la vivo de l' ŝipanoj dum milito. 114 p., 12x16 cm. V. Majakovskij: Per voĉo plena. Poemoj. 72 p., 12x16 cm.
- 15. Internacia Teatraĵetaro (diverslandaj aŭtoroj) kaj A. Kennigott: Ilustritaj rakontetoj. Kune 96 p., 12x16 cm.
- 16. E. Drezen: Skizoj pri teorio de Esperanto. — Paralela teksto rus-esperanta, 84 p., 16x24 cm.

- 17. Goldoni Carlo: Kurioza okazaĵo. Triakta komedio, El itala lingvo tradukis Mevo. Kun ilustraĵoj. 19x12,5 cm., 62 paĝoj. Franjo Modrijan: Elementoj latinaj en Esperanto. 46 p., 13,5x18,5 cm.
- 18. Vrede door Religie. Paco per religio, kolekto de legindaj prelegoj, parte holande, parte en Esperanto, faritaj dum Paĉkonferenco 1928 en Hago. 160 p., 14x20 cm.
- 19. Artur Domènech: Poemoj. (1877-1936) eldonitaj de Jaime Grau Casas. 36 p., 1,5x11 cm., belete presita. Jaime Grau Casas: Novaj amaj poemoj kaj La lasta poemo.
- 20. S. Grenkamp: Pola folkloro kaj popolkanto. Kun antaŭparolo de Prof. Zaleski. 10 melodioj kaj 9 ilustraĵoj ekstertekste. Eleganta libro, plaĉa 20x12 cm., 60 paĝoj.

Membro-Abonanto (MA)

(kiu ricevas, krom la membrokarton, la jarlibron kaj la gazeton dum la tuta jaro) rajtas elekti premion el la sekvanta listo kiel :

- Frupaganto de l'kotizo ĝis fino de Marto 1939 (ĝisnuna ano kiu realiĝas por 1939).
- Nova Aliĝanto dum la tuta jaro administra, de Novembro 1938 ĝis Oktobro 1939 (se li ĝis nun ne ankoraŭ estis membro).
- Varbinto de nova ano MA. — Membro kaj ne-membro kiu varbas novan MA= Membro-Abonanton por 1939.

- I. Bleier S. Cense: Ora libro de la Esperanto-Movado. Jubilea Kongreso 1937. 15x23 cm. Riĉa kaj valora 222 p., kompilaĵo ; fonto de informoj. Enhavo : Historiaj artikoloj, biografioj pri pioniroj, profetaĵoj k.a. Ilustrita. (Vendprezo 5 Frankoj sv. ; belega premio.)
- II. V. Varankin: Metropoliteno. Originala romano el la sovetia vivo. 200 p., 14x21 cm.
- III. Benito Mussolini: La vivo de Arnaldo. El itala tradukis K. Kalocsay. 106 p., 12x18 cm. Priskribo de l' vivo de la frato de l' itala diktatoro. Flua stilo vivoplena, analoga al la movplena enhavo.
- IV. K. R.: La Reĝo Judea. Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj. El rusa lingvo tradukis V. Devjatnin. 182 p., 12x18 cm. (K. R. pseŭdonomo de verkisto el cara familio Romanov.)
- V. Kolomano Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo. Studoj. 142 p., 13,5x18,5 cm. Utila verko por ĉiu, kiu deziras penetri en la spiriton de nia lingvo.
- VI. A. Kennigott: Internacia Frazaro. Ĉiutaga vivo. Internacia Dialogaro. Tri kajeroj, kune 160 p., 12x18 cm.
- VII. Ismael Gomez Braga: Veterano? Respondoj al la demandaro por la „Festo de la Veteranoj” de l'Jubilea Kongreso de Esperanto. 124 p.
- VIII. P. Lapiené. El litova poezio. 198 p., 12,5x18,5 cm. — Bela preso, arta kovrilo.
- IX. A. Stonimski: Mia vojaĝo en Sovetio. Tradukis S. Grenkamp. 142 p., 13,5x19 cm.
- X. Fr. Schiller: Wilhelm Tell. Kvinakta dramo, tradukita laŭ la versmetro de l'originalo, de L. E. Meier, pioniro unuatempa de Esperanto. 150 p., 12x18 cm.

Premioj al Subtenantoj

Subtenanto por la jaro 1938 rajtas elekti unu premion el la sekvanta listo. (Unu litero = unu premio.)

- A. Kalocsay-Waringhien: Plena gramatiko de Esperanto. Kun detala komentario pri vorto kaj frazo. Dua eldono. 488 p., 15x22 cm. — Monumenta verko.
- B. Herm. Haefker: Jarmiloj pasas. Universala historio. Du volumoj. Kune 500 p., kun ses artaj reproduktaĵoj kaj 11 geografiaj skizoj.
- C. Verkoj de Fe Z. Plena verkaro de D-ro Felikso Zamenhof. Kompilis Edv. Wiesenfeld, L. K. 271 p., 15x22 cm. Luksa eldono en bela bindaĵo. Kun aldonajo de „Praktika gvido de la Korespondo en Esperanto”, verkita por japanoj. Interesa verko por elmontri. (Belega premio.)
- D. H. W. van Loon: Rigardu la teron. Tradukis G. Saville. — La plej sukcesa verko de l'lasta jaro. Post lego de tiu ĉi unika libro terpriskriba la rilato de l'homo al la tero, la historio al geografio estos ne plu demando. Multaj ilustraĵoj. 454 p., 15x24 cm.
- E. Esperanto ŝlosilaro. Kolekto de ŝlosiloj de Esperanto en 24 lingvoj, fiksitaj sur fortika kartono, dufoje faldita, kunagrafoj por pendigi ĉe muro. Belega objekto, interesa reklamilo kaj alloga ekspoziciaĵo.

F. Antologioj. Bulgara, Ĉeĥoslovaka, Kataluna. Kune 1.110 paĝoj da teksto. Tri volumoj — unu premio.

G. Enciklopedio de Esperanto. Bindita eldono. Ilustrita. Oni rajtas elekti unu volumon de tiu. ĉi verko, 1 aŭ 2. Personoj kiuj deziras akiri tuj la duan sin turnu al la C. O. de UEA.

Tiu ĉi premio estas daŭrigota ankaŭ por estontaj jaroj, tiel ke elektante nunjare volumon 1 oni povas elekti la duan volumon en 1940 aliĝonte kiel MS.

H. Kolekto de kvin premioj de frupago el numeroj I-X. Laŭ libera elekto de l'Subtenanto.

J. Kolekto de ĉiuj premioj de frupago 1-20. 25 libroj kaj broŝuroj, kune pli ol 2000 tekstpaĝoj.

Okaze de elĉerpiĝo de unu aŭ alia verko, ni aldonas ion laŭ propra elekto.

Preztabelo 1939

Lando :	Mono :	MJ	MA	MS
Argentino	Pes.	2.50	8.25	20
Aŭstralio	Ŝil.	4	10	25
Belgujo	Frk. b.	16	40	175
Brazilo	Milr.	12	30	80
Britlando	Ŝil.	4	10	20
Bulgarujo	Lev.	50	125	350
Ĉeĥoslovakio	Kĉ.	20	50	125
Ĉinujo	Dol.	3	7.50	20
Danlando	Kr.	4	10	25
Egipto	Ŝil.	4	10	25
Estonio	Kr.	2	5	20
Finnlando	Fmk.	40	100	250
Franco	Frk. Fr.	15	40	125
Germanujo	Gmk.	Jara abono : 6	Gm.	
Greklando	Dr.	100	250	800
Hispanujo	Pes.	8	20	50
Hungarujo	Peng.	4	10	25
Italujo	Lir.	12	30	90
Japanujo	Jen.	3	8	15
Jugoslavio	Din.	30	100	200
Latvio	Lat.	4	10	20
Litovio	Lid.	6	15	40
Nederlando	Guld.	2	5	10
Norvegujo	Kr.	4	10	20
Novzelando	Ŝil.	4	10	25
Polujo	Zlot.	5	12.50	25
Portugalo	Esk.	15	40	100
Rumanujo	Lej.	100	250	800
Svedlando	Kr.	4	10	20
Svislando	Frk.	4	10	20
Urugvajo	Pes.	2.50	5	20
Usono	Dol.	1	2.50	5
(Kanado)				

Universala Esperanto-Asocio
Palais Wilson GENÈVE (Svislando)

Aliĝilo Mi deklaras mian aliĝon re-aliĝon kiel :

Membro — Membro-Abonanto — Membro-Subtenanto — Dumviva Membro.

kaj pagas la kotizon de per ĉeko-poŝtmandato-poŝteko-kontante, al Ĉefdelegito.

MI ELEKTAS premion de frupago n-ro :

Mi elektas premion de Subtenanto de la listo 1939 :

Mia nomo :

Mia adreso :

Dato : Subskribo :

Teksto de korespondado por Jarlibro 1939 : (Enpresos en senpaga) ; laŭdezire unu fojon en la gazeto.

Aŭtunaj poemoj
de estonaj poetoj nuntempaj

Oriĝinta betulo
de Mart Raud.

La folioj falas
de l'betulo for,
flava kiel or'.
La folioj falas,

ŝute jen malŝparas,
lante, kun terur',
ĉiujn la betul'.
La folioj falas.

Ĝi plorante staras,
larme, kun dorlot'
por ornam' de l'kot'
ĉiujn ĝi malŝparas.

Estis dum vesper'
aŭtuna...

de August Sang

Estis dum vesper, aŭtuna,
iom frost-aera.
En folirubaĵo bruna
putris bel' somera.

Ie kiel ĉiutage
bru-fermiĝis pordo.
En krepuskan parkon rage
iris vagabondo.

Sur ĉiel' la lasta ruĝo
estingiĝis plene.
Restis nur la fora muĝo,
eksonanta ĝeme.

Aŭtuna kanto
de Heiti Talvik.

Io pure kaj malvarme
por moment' tra boskoj spiris.
Dum maten' sur herbo svarme
prujn-fadenoj hele brilis.

Lastan kupron kun kvietaj
mov' disŝutis jam acero.
Nur pomarbo frukt-graveda
spitas al la frost-danĝero.

Nur pomarb' en ruĝkoloro —
tiel Frosto-avo trovas
min en la ĝarden-izolo.
kien li eniri provas.

Malfrua helianto
de Pedro Krusten

Super palisaro pendas la sanga kap'
de sorparbo, vipata de l'vento,
kontraŭ koto-abund' kaj vent-ekbat'
estas homo sur voj' sen defendo.

Jen finiĝis nun ies pilgrim' sur ter'.
veturilo kun ĉerk' preterpasas,
estas peste timiga aŭtun-ĉiel',
la vilaĝon la malsan' minacas.

Sub la nokta ĉielo aŭdiĝas nur
kri, de birdoj, fuĝantaj grand-
[kvante.
Sed ekfloras kaŝe en ĝarden-angul'
helianto, danĝeron spitante.

Kolera aŭtuno
de Kersti Merilaas.

La vento foliojn
de l'arboj deŝiras,
foŝaĵoj mucidan
vaporon elspiras.

Jen sible ekmordas
la bordojn rivero.
kaj super ĝi fulge
nebulas aĉero.

Arbustoj kadukaj
surborde malhelas,
aceroj kolere
per flamoj fajreras.

La nubotavoloj
densiĝas senĉese,
la lumo trafalas
humide kaj peze.

Subite ĉirkaŭe
nur ombroj ekpendas :
la manojn vi levas-
kaj krias kaj plendas.

Fermita rondo
Paul Virding

Verdajn ĝermojn ekstermis are
sperto-prujno, tranĉanta ĝis ost'.
Iluzioj sub foliaro
profunde dormas en frost'.

Turmentita sklav' de l'humoro,
por ĉiam ĉenita de l'sent',
en aŭtuna kot' sen konsolo
vi paŝas, ĝis blovos vent'

neĝamasojn sur velkajn foliojn,
sur rub-montojn de l'disreviĝ'...
aŭ vin savos de l'mortagonio
ies man' por vivofeliĉ'.

El la estona : Hilda Dresen

Fragmentoj

La spiritstaton de la popolo en Ĉeĥoslovakio bone ilustras
la jenaj fragmentoj, ideo-splitoj de K. Č. (Karel Čapek)
la fama multlegata verkisto.

Ne nomu tion malamo. Nomu tion ekkompreno.

Kontraktoj ekzistas por ke la malplifortaj plenumu ilin.

Dank'al tre granda penado de ŝtatviroj estas daŭrigata la monda
necerteco.

...en intereso de la paco intervenis per ĉia energio kontraŭ la
atakito.

Por la paco neniu fremda ofero estas sufiĉe granda.

Estas grandaj kaj malgrandaj potencoj. Estas ankaŭ grandaj kaj
malgrandaj senpotencoj.

Lokalizi konflikton : lasi viktimon al ĝia sorto. Likvidi
konflikton : faligi la viktimon.

Ĝi ne estas tiom malbona : oni ne vendis nin, oni donis nin senpage.

...Ni almenaŭ scias, kion ni perdis.

La mondo tamen progresas : anstataŭ perforto milita — perforto
sen milito.

Malsukceso : ne uzi okazon. Sukceso : fuzi okazon.

Malnova Testamento pravas : per simpla kriado iam fortifikaĵoj
estis faligitaj. Sed per simpla kriado oni nenion kapablas konstrui.

Kia mizero, veki tiom da simpatioj !

Ne, nia koro ne grasiĝos.

Kvankam malfeliĉaj, ni nur ne estu malgrandaj !

Almenaŭ tion ni evitu : esti trompitaĵ de ni mem.

Eĉ sur brutantaj ruinoj kelkiuj varmigas sian supon.

Nu vidu, estas tiaj, kiuj mem volus doni pli ol teritorion.

Denove konstruadi ŝtaton... por tio vere valoras vivi.

Nur tiu vere kredas, kiu laboras antaŭen.

Novaj homoj estas nur tiuj, kiuj kapablas plenumi novajn taskojn.

El « Lidové Noviny »

Tradukis SKL.

La font-kreso
Botanik-bonmanĝula babilajo

Vegetarano kaj viandmanĝanto
estas du kontrastoj ! Se ambaŭ
ne interkonsentas pri la principo
en la nutrado, tiam pri unu
« verdaĵo » ili ambaŭ harmonias
en la opinio, ke verda salato estas
io nepre bona. Salato ja estas la
nomo por preparaĵo **salita**,
ĉefe verdaĵoj kun malsamaj nomoj
el diversaj plantfamilioj. Inter ili
la plej riĉa salatliveranto, la
laktuko.

La propagando de l' vegetaranoj
por la sen-vianda vivado, plie la
arda deziro « **konservi la linion** »,
alivorte resti svelta, popularigis
grandskale diversajn variaĵojn de
tielnomataj salatoj, kreitaj de
kulturistoj. Sed samtempe oni
rehonorigis foje konitajn specojn
de verdaĵoj. Pri unu el ĉi tiuj
verdaĵoj ni iom babilu.

Dum vintro, kiam kutima salato
ne estas aĉetebla en aro da lan-
doj, la verdŝatanto ĝojas revidi
sur la vendplaco, korbojn plenajn
je malhel-verda folietaro, ligitajn
en malgrandaj faskoj. Estas la
font-kreso.

La vintra temperaturo ne in-
fluas je la kresko de tiu ĉi plan-
taĵo. Kontraŭe, malvarmo kaj
humideco pleje subtenas, ke la
fontkreso havu tiun ĉi delikatifor-
tan guston spican de ĉi tiuj fo-
lio.

La fontkreso estas plantaĵo,
jam konita en la antikveco kla-
sika. Jam la greka kuracisto
Dioskorido rakontas, ke la font-
kreso estas manĝata krude kaj
multe uzata kiel **santiga** rimedo.
La Romanoj uzis ĝin por spici la
manĝaĵojn; ili ne uzis la fo-
lietojn, sed la trunketojn, kiuj,
laŭ teksto el la kvara jarcento,

estis venditaj en fasketoj de 20
pecoj. Ankaŭ en germanaj tekstoj
frutempaj oni rilatas al ĝi, sed
oni ŝatis ĝin kiel sanigilon ĉefe
por sangpurigado. Por tiu ĉi celo
oni manĝis la krudajn foliojn kiel
medikamenton kontraŭ brust-do-
loroj, je kio oni uzis la tielnomat-
an « Fontkres-sukeron », sekan
miksaĵon de kresfolioj, rapitan
kune kun sukero. Hufeland, la ku-
racisto-verkisto (1762-1832) reko-
mendas en sia fama verko « **Mak-
robotiko, aŭ la arto plilongigi la
homan vivon** », la fontkreson
kontraŭ iskiatio, kaj peza sango.
La moderna medicino ankaŭ re-
komendas la fontkreson kiel nutra-
ĵon kun saniga efiko.

Kiu ne ŝatas ĝin kiel salaton,
kvankam ĝi facile digestiĝas,
manĝu la foliojn haĉitajn, iom
salitajn, sur buterpano. Laŭ tiu
ĉi formo la fontkreso ne estas
nur plej nutriga pro la vitaminoj
troviĝantaj en la kruda folio, sed
ĝi ankaŭ efikas apetitinŝtigi, spe-
ciale je malfortecaj, anemiaj ho-
moj, havantaj inklinojn por manĝa-
ĵoj spicitaj, sed povantaj toleri nur
malpezan menuon. Tiu ĉi gusto
forta kaj incita devenas el sufiĉe
akra etera oleo, la kres-acidaĵo
trovebla en la folioj, kaj kiu donis
la nomon al la kreskaĵo.

Recepto por bongusta supo
estas la jena : Oni preparu per
butero kaj iom da faruno la
kutiman blankan saŭcon laŭ Be-
chamel, likvidan, kun laŭvola
aldono de viand-ekstrakto; poste
oni aldonu la haĉitajn folietojn
lasante ĉion sur la forno kun ne
tro forta flamo dum kvaronhoru.
Batita ov-flavaĵo, aldonita antaŭ
servado estas konsilinda.

La kulturado de l' fontkreso
estas originala kaj penplena. Ĝi
kreskas ja libere en multaj lokoj,
prefere ĉe riveretoj, fontoj kaj
fosaĵoj kun akvo klara. Tamen,
la sovaĝa fontkreso ĝenerale ha-
vas amaran kromguston. Por kul-
turi la fontkreson, oni devas
atenti la naturajn vivkondiĉojn;
sekve oni kreskigas ĝin en arte-
faritaj akvofosaĵoj, daŭre tra-
fluataj de freŝa akvo. Dum Aŭ-
gusto oni komencas la plantadon;
antaŭe la fosaĵoj devas esti bone
purigataj kaj sterkataj. Tiam
oni enplantas la detranĉitajn pin-
taĵojn de antaŭjara plantaĵo
kovrata iom post iom per akvo,
sekvante la kreskadon.

Oni manĝas la fontkreson nur
dum vintro; printempe, kiam ek-
floras la plantaĵo, la folioj iĝas
ledecaj, malmolaj neagrablaj laŭ
gusto, pro tio nemanĝeblaj.
Kaj fine ni vidu la vorton. La
fontkreso¹ apartenas al la fami-
lio de l' kruciferoj. Ĝia botanika
nomo estas Nasturtium. La vorto
kreso, uzata kun ŝanĝiganta
ortografio eniris en multajn ling-
vojn. Ĝi signifis en la malnova
germana « **akra** »; apud ĝi la
vortaroj citas « **nasturcio** », kies
signifo estas « **naz-incitiga** ».

Kaj post ĉio :

Gustumu la kreson kun bona
apetito !

¹ Nasturtium officin. — *Angle* :
watercress — *Ĉeĥe* : rericha potoční
— *Dane* : brøndkarse — *France* :
nasturce, cresson — *Germane* : Brun-
nenkresse — *Hispane* : berro — *Ho-
lande* : waterkers — *Hungare* :
zsázsa — *Itale* : crescione di fontana
— *Svede* : Källkrasse.

Malnovaj kult-konstruaĵoj
hebreaj en Germanujo

La ondego de detruado, pasinta
dum ĉi tiu monato super la pose-
daĵo juda en Germanujo, vekis ĉie
sentojn de simpatio. Ne estu forge-
sata, ke estis detruitaj ankaŭ valo-
raĵoj kulturaj kaj artaj. La plimul-
to de la sinagogoj en Germanujo
estas de juna dato, aŭ ili estas
konstruitaj en la lastaj tri jar-
centoj. Ekzistas kelkaj judaj kult-
konstruaĵoj, kreitaj en la romans-
tila epoko, pruvantaj ke en tiu ĉi
tempo jam troviĝis judoj, daŭre
loĝantaj en tiu ĉi lando. La plimul-
to de la konstruaĵoj troviĝas en la
regiono de la Meza Rejno. Ekzem-
ple Worms posedas post Speyer
(Spire) la plej malnovan sinagogen,
kies muroj estas tutcerte de
la 12-a, se ne eĉ de la dekunua jar-
cento. Ĉar la prezentado de vivan-
taj estaĵoj estas malpermesata pro
religiaj motivoj, la interno de ĉi
tiuj sinagogoj estas sen ornamaĵoj,
tiel ke ili ne povis sin samrangigi
al samtempaj pomp-konstruaĵoj
kristanaj.

Rimarkinda juda konstruaĵo el
la romanstila epoko troviĝas en
proksimeco de Frankfurt a.M. Te-
mas pri la Juda banejo en Fried-
berg, (Hessen). Ne nur pro ĝia
malofteco aŭ pro kulta kaŭzo tiu
ĉi banejo meritas intereson. La
konstruaĵo, kiu ne estas banejo en
la kutima senco, sed rita virina
banejo, troviĝas pli ol dudek me-
trojn sub la surfaco tera. La ŝtona
ŝtuparo, kondukanta malsupren, es-
tas tute bone konservita. Kvan-
kam ĝi estas konstruita de judo —
Isaak Koblenz — en la jaro 1260,
la ornamaĵoj similas treege al tiaj
de la samepoka urba preĝejo.
Spite la severa apartigo religia
inter kristanaro kaj judaro, ekzis-
tis tamen intimaj rilatoj, inter la
kristana kaj juda arto. Ĉu la van-
dalismo de la pasinta semajno atin-
gis ankaŭ ĉi tiujn art- kaj kult-
verkojn, ne estas konate ĝis nun.
Ĉuokaze ilia detruo signifus per-
don neripareblan laŭ arta vidpunk-
to.

Tra la Gazetaro

Pola Esperantisto Esperantysta Polski

ELDONANTO — REDAKTO
POLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ — REDAKTOROJ
PROF. DR. ODON BUJWID — MGR. TADEUSZ HODAKOWSKI

Respondante al P. E. pri ĝia plendo pro artikolo « **Vorto pri Litovujo** » ni ja konsentas, ke la vortoj uzitaj povis ofendi. Tamen ni enpresis ! Tio ne signifas, ke ni aprobas la formon ! Ni simple opinias, ke la malpli potenca, povu ankaŭ aŭdigi sin, kaj ŝajnas al ni iom strange, ke popolo kun apenaŭ 3 milionoj da loĝantoj povus senkaŭze sin levi kontraŭ najbaro, dekfoje pli nombra. Vole ne vole la simpatioj turnas sin al la malplimulto ! Kaj se tiu ĉi, okaze de batalo papera uzas vortojn akrajn, oni peni pensi en ties haŭto. Ekzistis tempo, kiam ĉie en la mondo regis simpatioj por Polujo. Ni ne povas diri, ke ĉi tiuj simpatioj ekzistas ankoraŭ en sama amplekso. Ankaŭ Poloj ŝajne forgesis, ke iam ili estis subpremitoj. Same kiel en la malfeliĉo ankaŭ en la feliĉeco pruviĝas la fortaj animoj, memorante la ŝanĝeblecon de l'sorto.

Lietuvos Žvaigždė

LITOVA STELO

Lietuvos Esperantininkų Draugijos organas
Organo de Litova Esperanto Asocio

rifutas en Sept-Oktobra numero la proteston de « Pola Esperantisto » pro ofendaj aludoj en artikolo « Vorto pri Litovujo », (Aprila numero de Esperanto).

« Litova Stelo » konsentas :

« *Komprenoble, tiaj disputoj ĉiam estas bedaŭrinda afero, kaj ni plene samopinias kun s-ro Sapiro, ke nek « ESPERANTO » nek Esperanto devus pligrandigi la abismon inter la popoloj. Eĉpli, laŭ nia opinio, ankaŭ apartaj ŝtatoj tion ne devus fari. Tamen, bedaŭrinde, certaj ŝtatoj sukcesis eĉ dufoje nunjare ataki siajn najbarojn, kaj ni kuraĝas aserti, ke malaprobata esperantlingva opinio pri tia agado ne estas ankoraŭ atako kontraŭ tiuj ŝtatoj. Tial ni ne trovas ataka ankaŭ la artikolon « Kien ni iras » en la nr. 468 de « Esperanto ». Tion principe pri la problemo de atako ».*

Ankaŭ ni opinias, ke neniel malhelpas, se en niaj gazetoj oni traktas nuntempaĵojn. Ni konatiĝu, kvazaŭ kiel kuracisto, kun kaŭzoj de konfliktoj. Komprenoble konvenas bonformo inter ni !

L'ESPERANTO

PERIODICO DI INFORMAZIONI E COMMENTI

VENTICINQUESIMO ANNO - N. 12
Gennaio - Febbraio 1938
Redazione e Amministrazione: MILANO, Cortina Vecchia, Espresso 40 - C.P. 70000 271875
UN NUMERO LIRE UNA
PUBBLICAZIONE MENSILE - PREZZO IN AVANCEMENTO POSTALE

La "vero" en la UEA-gazeto

« La vero venkos » diras UEA en artikoleto pri recenzo farita de nia gazeto. Sed por esplori kio estas la « vero » laŭ UEA, estas eble bone ke ni priparolu unu momenton pri alia artikolo de la gazeto de UEA, nome pri la artikolo « Esperanto en Italujo » publikita en la n. 457 de la 15.a de februaro 1938.

Siatempe naŭziŝ nin (estas la plej taŭga vorto) respondi al la sensencaĵoj de tiu artikolo, en kiu oni rakontis la historion de la rilatoj inter UEA kaj la Itala Federacio, laŭ tute... speciala vidpunkto, sed ni vidas nun ke pli oportune eble estas priparoli la aferon.

Ni havas en nia arkivo sufiĉe da leteroj por pruvi kiom malproksimaj de la vero estas la asertoj de tiu artikolo. Sed al ni sufiĉas montri ion, pri kio ĉiu samideano povas fari per si mem kontrolon.

Asertis la skribinto de la artikolo, H. J., (ĉu la konata Hans Jakob ?) kaj substrekis la vortojn, ke : *ne ekzistis kaj ne ekzistas la leĝa malhelpo por la funkciado de UEA en Italujo.* (Ni atentigis tiutempe pri la neceso de speciala permeso, kaj montris ni mem la vojon por ĝin havi, kiun poste sekvis UEA !).

Do ĉiu samideano povas facile havigi al si en iu biblioteko la Italan Punleĝaron de la jaro 1931, la nuntempan punleĝaron, kaj legi la artikolon 274, kiu laŭvorte diras : « Ĉiu ajn aliĝas en la ŝtata teritorio al asocioj, institucioj, aŭ ties sekcioj, kun internacia karaktero, por kiuj ne estas donita permeso de la Registaro, estas punata per monpuno de 1000 ĝis 10.000 liroj.

La sama puno estas por la civitano, loĝanta en la ŝtata teritorio, kiu, sen Registara permeso, aliĝas al asocioj, institucioj kun internacia karaktero, kiuj havas sian sidejon en eksterlando ».

Tio por la simplaj « ano » ; por la organizantoj kaj estrantoj (art. 273) estas antaŭvidata puno ĝis 6 monatoj en karceron.

Ĉu s-ro H.J., kiu eble scipovas italan lingvon, ne sukcesis tralegi kopion de tiu kodo ? Ĉu li opinias ke konformiĝo al nova Punleĝaro de propra lando estas vere nur « ridinda postulo » de la « tiamia Esperanto-Estro en Italujo » ?

Do ne estis kaj ne estas, kiel diris S-ro H. J., nur leĝo limiganta la rajton partopreni en internaciaj societoj al ŝtatoficiistoj, ĉar estas simple komprenbla afero ke Punleĝaro rilatas al ĉiuj civitanoj.

Tiaspeca estas la « vero » de la artikoloj de la UEA-gazeto. Ĉu ĉe S-ro H.J. estis nesciado aŭ malbonfido ?

Ambaŭ, ni opinias, ne bonaj ecoj por batalanto de la Esperanto-movado.

Univ. P.ro G. Canuto

Je tio ni respondas :

1. Ni informiĝis rekte ĉe la reprezentantoj de la Itala Registaro en Genèvo. La koncerna alta funkcio, Barono d.F. diris, ke laŭ li, ne ekzistas malhelpo por lingva kaj senpolitika klopodado.

2. Ni ripetas do, ke ne ekzistas malhelpo por UEA, labori en la kadro de la statuto, prezentita al la Itala registaro, kiu informis nin :

ORIENTA KURIERO

者 使 東 遠

MONATA ILUSTRITA REVUO
Hongkong — P. O. Box 10

La Septembra numero de tiu ĉi revuo sin turnas en ĉefartikolo « **Al la Esperantistaro** » kun la propono krei servon de helpado al la ĉina popolo. Jen la koncerna parto :

En tiuj konfuzitaj cirkonstancoj ni parolas al la tutmonda esperantistaro. Ili estas plejparte idealistoj, ĝis iu grado pli komprenemaj ĉe al ne simpatiaj ideologioj. Almenaŭ ili konservu sian menson kaj juĝkapablon en la ĝenerala krizo. Almenaŭ ili restu fidelaj al la veraj homaj idealoj, ili restu malvarmaj en la epoko de konfuzo. Ni fidus ilin, ni kredas en ilia solidareco. Sur la bazo de nia konfido ni sugestas projekton pri organizo de speciala ESPERANTO-BAZO por kolektiva esperanto helpo al Ĉinio.

Ni proponas la kreon de speciala esperanto helpo, financa, medikamenta, novaĵserĉa kaj propaganda.

La celo estas duobla. Doni realan helpon al nia lando, centrigi la ĝis nun disfunkciajn fortojn sur esperanto kampo kaj samtempe, per la rezulto de nia laboro pruvi la konkretan valoron de nia lingvo.

La alvenontajn monsumon kaj medikamenton ni sendas al la ĉina armeo, menciante, ke ĝi estas la donaco de tutmondaj esperantistoj. La presservon ni utiligas en la ĉinlingvaj tagaj gazetoj, tradukante la ricevitajn materion en nacia lingvo kaj samtempe ni sendas esperanto kaj anglalingvajn materiojn al niaj provizantoj.

Plene simpatianta kun atakitoj, ni tamen kredas estus pli konvene, ne fari tiajn kolektojn. Pro simpla kaŭzo. Unue : ni estas tiom malmultaj, ke praktike ne rezultas io atentinda. Due : se jam oni entreprenas ion tian, oni pensu al viktimoj. Por kuraci la vundojn, ne por krei novajn, ni devas labori, ideo kaj fizike. Por la milito, tiom por la atako kiom por la defendo, ĉiam troviĝas la rimedoj. Dume la viktimoj sen armiloj, la virinoj, infanoj, maljunuloj en bombarditaj urboj plejofte ne ricevas la helpon kiun ili kriante alvokas. Esperantistoj, kiuj deziras kunhelpi faru tion plej bone en kontakto kun ekzistantaj organizaĵoj por tiu ĉi celo.

(6 Junio 1934).

Ŝekve de nia konversacio de la 4-a de Junio mi havas la arantaĵon komuniki al vi, ke la Reĝa Ministerio de l'Interno bonvolis doni la 28an de Februaro lasta, sian propran konsenton, ke la Universala Esperanto-Asocio, kun sidejo en Genèvo havu reprezentantojn en Italujo. Bonvolu akcepti, Sinjoro Direktoro, miajn plej bonajn salutojn.

3. Ni korektas do nian konkludon en la rilata artikolo forigante la vorton « leĝa », antaŭ malhelpo tiel ke ĝi tekstas :

Unuvorte : Ne ekzistis kaj ne ekzistas ia malhelpo por la funkciado de UEA en Italujo.

Siatempe la Ĝenerala Konsulo en Genevo diris al ni, ke tiu ĉi leĝo en la aplikado neniel celas societojn kiel UEA. Ni tamen nin direktis al la fonto mem, nenion kasantante, nenion aranĝante.

Sed precize, tion kion ni faris, ne volis Sinjoro Orango, nome nin rekte turni al la ŝtatĉefo. Pri la ceteraj detaloj ne havas plu sencon paroli. Ĉiu rigardas la aferon laŭ sia maniero, kaj ni ne volas devigi Profesoron Canuto akcepti la nian.

Esperanto en Francujo

Oni ĝoje surpriziĝis, aŭdinte dum pasinta monato per la Radio, la novaĵon pri libervola instruado de nia lingvo en francaj lernejoj.

La nuna decido estas unua paŝo al la deziro de ni ĉiuj : Esperanto en lernejon. Kaj en tiu ĉi mizera tem-

po, kiam nia lingvo estas ekstermata en iuj gravaj landoj, la gesto de l'franca Ministerio por Eduko estas kvazaŭ konsolo por ni.

Ni reproduktas la tekston en originalo kaj poste en esp. traduko.

Paris, le 11 octobre 1938.

Le Ministre de l'Education Nationale à
Messieurs les Recteurs

Mon attention a été appelée à diverses reprises, sur l'intérêt que présente, dès maintenant, et que présentera davantage encore dans l'avenir, la connaissance de l'Espéranto, langue auxiliaire susceptible de faciliter les relations aussi bien entre les intellectuels qu'entre les commerçants et les techniciens des diverses nations.

J'ai l'honneur de vous faire connaître qu'il me paraît souhaitable de faciliter le développement des études espérantistes. Certes il ne peut être question de donner à l'enseignement de l'espéranto une place dans les horaires obligatoires de nos établissements du second degré et dans nos écoles techniques. Mais si des cours facultatifs d'espéranto peuvent être institués, je n'y verrai que des avantages. On peut l'admettre aux Loisirs dirigés.

Je vous serais obligé de porter ces instructions à la connaissance des chefs d'établissement scolaire de votre Académie.

Le Directeur
de l'Enseignement Technique,
Signé : H. LUC.

Par autorisation
Le Directeur du Second Degré
Signé : CHATENET.

Parizo, la 11-an de Oktobro 1938.

La Ministro de Nacia Edukado al
Sinjoroj Rektoroj

Mia atento estis diversfoje vokata al la intereso kiun reprezentas de nun, kaj kiun reprezentos ankoraŭ pli en la estonto, la kono de Esperanto, helpa lingvo kapabla faciligi la rilatojn tiom inter la intelektuloj kiom inter la komercistoj kaj la teknikistoj el diversaj nacioj.

Mi havas la honoren vin sciigi, ke ŝajnas al mi dezirinde faciligi la disvastigon de la studo de Esperanto. Certe ne povas esti demando deni al la instruado de Esperanto lokon en la horaron de la devigaj studoj de niaj duagradaĵaj establaĵoj kaj de niaj teknikaj lernejoj. Sed, se laŭvolaj kursoj de Esperanto povas esti enkondukataj, mi vidos en tio nur avantaĝojn. Oni povas tion allasi al la « Direktataj Distraĵoj ».

Mi estus al vi danka, se vi transigus tiujn instrukciojn al la kono de la ĉefoj de l'studaj establaĵoj de via Akademio.

La Direktoro de la Teknika
Instruado
Subskribita : H. LUC

Laŭ rajtigo
La Direktoro de l'Dua Grado
Subskribita : CHATENET

Niaj Mortintoj

S-ro D-ro Paŭlo Staniŝiĉ, advokato et Zemun, Jugoslavio 12an de Septembro. Malnova esp-isto, antaŭa delegito de UEA, fondinto kaj prezidinto de la grupoj en Vinkovci kaj Zemun, en kiuj loko li gvidis plurajn kursojn. Kiel financa spertulo kaj adepto de la novekonomia movado de Silvio Gesell, multe li verkis en tiu direkto. En la esp. gazetaro li ankaŭ aperigis plurajn artikolojn, eldonis kelkajn broŝurojn, kunredaktis la iun tempon en Germanujo aperantan « Nova Ekonomia Politiko ». Lia laborenergio ŝajnis esti neelĉerpebla, tamen, la trostreĉigo influis, li fariĝis nervmalsana, kaj, post okmonata suferado, memvole forlasis la mondon en la aĝo de 60 jaroj. En la memoro de siaj konatoj li restigis memoron de honesto kaj justemo.

Sinjoro John J. Boutwood, Hastings Anglujo, 22 Oktobro 1938, 78 jaraĝa. Jen malaperis plia elstara figuro de la movado en Britujo, viceprezidinto de la Brita Asocio ; malnova amiko de UEA, ano 1561 ĝis 1936 kaj longjara Delegito por fama loko Hastings.

Nia kunlaboranto-desegnisto S-ro Emile Curtenaz en Genèvo priploras la forpason de patrino.

SIGELMARKOJN kaj POŝTMARKOJN

interŝanĝas kun la tuta mondo S-ano Giovanni Della Savia — UDI-NE (Italujo) — Via della Valle, 12.

POŝTMARKOJN

deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj: F-ino E. Jonassen, Norrlandsgatan 13-III, Stockholm, Svedujo.

BILDPOŝTKARTOJN

speciale de Aŭstrio, PM, poŝtstampojn kun Esperantoteksto serĉas, interŝanĝas: E. Anderegg-Chevalley, Horn, Thurgau, Svislando.

POŝTMARKOJN

interŝanĝas, kun Esperantistoj en Irlando kaj Naciisma Hispanio: C. Hildebrandt, Falltorstr. 3, Frankfurt-am-Main, Germanujo.

FOTOJN EL NORDO

kontraŭ 1 respondkupono por 2 ekz., diversaj ricevos ĉiu deziranto de: Ivan H. Krestanov, str. 6 Septemvri 2, Sofia, Bulgarujo.

Fondinto: H. Hodler, † 1920
Redakcio: Genèvo.

Red.: Provizora Komitato de UEA
Presis: Granchamp,
Imprimerie, Annemasse, (Haute-Savoie)
Dato: 15/30 Novembro 1938

